Año II (N.º 19)

BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 7

JULIO 1950

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)



ANTE LOS PROXIMOS CONGRESOS

La importancia de un movimiento idealista no se calibra por el número de sus adeptos, ni por el ruido que produzcan sus propagandistas.

El postulado esperantista, en pro de la aceptación de un idioma auxiliar, común para todos, con el laudable deseo de proporcionar a la humanidad un eficiente instrumento de paz y de cultura, no debe medirse por los cientos de miles de sus fervorosos adeptos, ni por la lenta —pero firme— expansión de su influencia.

El rasero de su importancia social lo da la calidad de sus componentes: pobres y ricos, sabios profesores y rudimentarios aprendices, técnicos competentes y simples braceros; pero todos ellos henchidos de buena voluntad y mejor intención, con infatigable entusiasmo, en sus afanes de mutua comprensión. Precisamente, lo que centuplica la valía de estos sentimientos, de inapreciable valor moral, en estos tiempos tan borrascosos, es el hecho de que desde su iniciación —hace ya más de sesenta años— la esencia cultural, el acervo de humanidad, y hasta el contenido lingüístico del Esperanto, han permanecido inalterables.

Desde que Zamenhof creó el idioma auxiliar, hasta hoy, el idioma ha ido completándose y creando nuevas voces, para responder a los nuevos conceptos, pero ha permanecido inalterable a través de su evolución. Tan actual, en cuanto al léxico, es una poesía de Zamenhof, como el último artículo de Malmgrem. Esta es la fuerza del Esperanto y el secreto de su permanencia. Y esa es, de manera evidente y con firmeza creciente, la razón de su triunfo sobre otros proyectos lingüísticos, anteriores y posteriores, pero siempre efímeros y fugaces.

Así pues, de la misma manera, y con el mismo léxico empleado en 1905, durante el I Congreso Universal de Esperanto, se oirán las más cálidas palabras, con una voz de resonancia, comprendida por los esperantistas de todo el mundo, en los Congresos que van a celebrarse durante el próximo mes de Agosto: el XXXV Universal en Paris, el XXII Católico en Roma y el XXIII Laborista en Turin.

En todos ellos hablarán —¡por medio de un solo idioma!— hombres y mujeres de diversas razas y diversos países, profesando diversas religiones y diversos idearios políticos y sociales, pero unidos todos por la grata eufonía de un idioma común, maravilloso por su belleza y genial por su sencillez.

A todos ellos, y a los miles de samideanos que de corazón querrían estar con ellos, les enviamos desde aquí el saludo cordial de los esperantistas españoles que, en su mayor parte, acariciaron ilusionadas esperanzas de participación y que, a última hora, se fundieron como la cera a los ardorosos rayos del sol hispano.

La turismo, same kiel la rajto al somera libertempo, ne devas esti aparta privilegio por reduktita rondo, sed socia postulo kaj nepra bezono por la sano kaj kulturo de la tuta popolo. Nu, Esperanto, per la vasta reto de sia perfekta organizo, de ekstremo al ekstremo de la mondo, ebligas al modesta samideano la plezuron de komforta vizito al eksterlando, kun minimuma elspezo kaj maksimuma profito!

ESPERANTO EN GRAVA KATOLIKA CEREMONIO EN ROMO

(Espero Katolika n.o 392 Februaro 1950)

La 12an. de januaro okazis en la granda preĝejo S. Andres della Valle en Romo la tiel nomita «Diservo de la Nacioj», antaŭ impona ĉeestantaro, inter kiu multaj ambasadoroj kaj diplomatoj. kaj miloj da eksterlandaj pilgrimantoj. En 25 lingvoj, knabetoj el la plej diversaj nacioj honoris la Infanon Jesuo per poeziaĵoj, preĝoj kaj kantoj. La grandioza ceremonio estis disaŭdigata kaj kinefotografata.

Preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj, kiuj raportis pri la ceremonio, aparte menciis la uzon de Esperanto.

Samideaneto Karlo Minnaja, tre aplaŭdite, deklamis en Esperanto la jenan poeziaĵon inspiritan je la preĝo por la Sankta Jaro.

Pacon,
Sinjoro, donu al niaj tagoj
Persiste turmentataj de l' ĉagreno:
Naskiĝu la estimo en la agoj,
En la mondo rebrilu la sereno!

Pacon,
Sinjoro, donu al la animoj
En senĉesa peniga maltrankvilo:
Ho, forflugu el ĉiu kor' la timoj
Kaj la dolor'! Ridetu la pupilo!

Pacon,
Sinjoro, al la familioj
Time vivantaj sub detruminaco:
Ilin streĉligu amaj energioj
Protektata de daŭra dia graco!.

Pacon,
Sinjoro, al la patrolando!
En ĝi regu prospero kaj konkordo:
La filoj kunlaboru al ĝia grando
Per konstanta progreso en la ordo.

Pacon,
Sinjoro, inter la nacioj
Sin rigardantaj kun suspekta koro:
Celante al tutmondaj harmonioj
Fratiĝu la homar'; Pacon, Sinjoro!

verk. Lumi.

Nuestro buen amigo Carlos Mestre Descalzo ha sido designado representante en España de la Asociación Católica Esperantista de la Argentina.

Nos complace que haya recaído tal nombramiento en un activo miembro de nuestra Federación a quien felicitamos, deseándole toda clase de aciertos.

⊚⊚⊚⊚⊚⊚⊚⊚ PRIPENSINDE...

Foje al rabeno alvenis riĉulo-piulo, sed li estis granda avarulo. La Rabeno ekprenis lin ĉe la mano, alkondukis al la fenestro kaj diris: Rigardu! Kion vi vidas?. La riĉulo respondis, ke li vidas homojn.
Poste la Rabeno reekprenis lin ĉe la mano, alkondukis al la spegulo kaj diris: Rigardu! kion vi vidas nun?'
— Nun, respondis la riĉulo, mi vidas nur min mem. Tiam la Rabeno diris al li: Komprenu, en la fenestro kaj en la spegulo estas vitro, sed la vitro de la spegulo estas iomete kovrita per arĝento. Kaj kiam io estas nur iomete arĝentumita, tiam oni ĉesas vidi homojn kaj komencas vidi nur sin mem.

De ,Hebreaj rakontoj'
Biblioteko ,Lumo el ĉio,
Eldono: N. B. Ĥavkin,
Jerusalemo

ESPERANTO KAJ SPORTO

Jen, estimataj samideanoj, du gravaj aferoj, treege necesaj dum la juna aĝo; unu por plifortigi la korpon. la alia por plifortigi la menson, en rilato kun la spirito, inter ĉiuj homoj, kiuj amas la pacon.

Nun, kiam en nia lando, Esperanto vekiĝas de longa letargio, certe estus konvena la kreado de sportaj sekcioj, ekzemple pri piedpilko kestpilko, k.t.p. en la Esperanto-Kluboj aŭ en la Esperanto-Fakoj de la diversaj societoj, kie nia lingvo vivas. Tute certe, la verda stelo, sur la kamizoloj de niaj kuraĝaj sportuloj, donus publikan ateston pri la ekzisto de nia kara kaj nobla idealo.

La ligiloj de amikeco, inter la tutmonda esperantistaro, povus trovi, dank' al la sporto, novajn rimedojn kaj manierojn por disvastigi la genian verkon de doktoro Zamenhof.

Nu. kiu estos la unua Esperanta Societo praktikanta la sporton inter siaj junaj membroj? Kiam oni povos legi, en niaj gazetoj kaj bultenoj, interesajn partiojn de piedpilko aŭ kestpilko inter la teamoj de samideanaj kluboj?

Mi esperas kaj deziras, ke plej baldaŭ...

Ramón Bach
Sekretario de la klubo de piedpilko "Gimnástico de Manresa (Barcelono)

LA INTERNACIA LINGVO ESTAS DEFINITIVA KOMPLEMENTO POR UTILA AFERO KUN INTERNACIA AMPLEKSO!

SIMPLECO DE VORTOJ

Ni represas tre plezure, el la bonega nederlanda gazeteto LA PROGRESANTO, jenan artikolon, kiun varme ni rekomendas legi al niaj legantoj.

Simpleco de stilo estas la ĉefa premiso por facile komprenebla teksto. Simpleco de stilo rezultas el diversaj faktoroj: logika rezono de l' skribanto, laŭorda frazkonstruo, ellaso de superfluaj frazelementoj, estetika aranĝo de la vortoj k.t.p. sed ĝi komenciĝas jam ĉe la frazelemento mem, ĉe la vorto.
Ni dediĉu nun iom da atento al la simpleco de la vorto.
Simpleco de la vorto povas konsisti en ĝia konateco kaj en ĝia formo. Ni konas la emon de multaj homoj traplekti siajn frazojn per multe da fremdaj vortoj. Tio imponas! Ĉe multaj homoj evidente regas ia neplene konsciata sento: ju malpli klaraj estas iliaj vortoj des pli da respekto ili rikoltas. Kaj tiu fakto sendube ankaŭ kontribuas al la pezeco de stilo en kelkaj esperantaj gazetoj, kaj al la misornamo per multaj neologismoj. Al sperta kaj inteligenta leganto tio impresas ridige. Sed komencantojn tio povas fortimigi, ĉar ili ne jam akiris la povon distingi inter bona kaj malbona stilo.
Ĉiu komprenas, ke Esperanto evoluas ankaŭ en sia vortriĉeco: ke por ĉiu nova ideo ni bezonas novan Esperantan vorton. Tio tamen ne signifas, ke ĉiun novan vorton ni blinde transprenu el aliaj lingvoj Se ni povas formi ĝin el jam ekzistantaj Esperantaj radikoj, ni faru tion, sed ne senbezone kreu novaĵon, t.n. neologismon.
Sed ankaŭ laŭforme la vortoj estu simplaj, t.e. oni ne uzu tro longajn vortojn, nek vortojn kunmetitajn el tro multaj elementoj. Kaj en tiu ĉi rilato konvenas konsilo, speciale al novaj esperantistoj.

Komence, ni ĉiuj emas traduki vorton per vorto. Ni ne ŝatas lasi iun vorton ne tradukita sed ankaŭ ne traduki unu vorton per du aŭ pli. Kaj tamen, tradukante en kiun ajn lingvon, ni devas konscii, ke ni pli ĝuste transmetas ideojn, ne vortojn. Se iu ideo en iu lingvo bezonas nur unu vorton, ĝi eble postulas en lingvo alia du, aŭ inverse. Ankaŭ Esperanton tio koncernas. Tamen, ĉar Esperanto ne estas „nature" estiĝinta lingvo, ĝi komence ne disponis pri fiksita normo por tuj repuŝi nekonvenajn vortformojn. Nur iom post iom estiĝis tradicio, en kiu simpleco, tuja kompreneblo kaj estetiko ludas rolon. Kaj tiuj faktoroj nun estas la principoj, laŭ kiuj ni formu niajn vortojn. Praktike tio signifas:
ke ĉiu traduko, kiu aspektas tro longa kaj ne estas unurigarde transvidebla, estu dividita en du, ekz, ne *propagandfolieto*, sed *propaganda folieto*;
ke en okazo de neceso oni intermetu prepozicion, anst. *parlamentbaloto* · *baloto por la parlamento*;
ke neeviteble longan kunmetaĵojn oni almenaŭ ŝajne dividu per interstreko: *Esperanto-instituto*;
ke oni nepre evitu sinsekvajn ĝenajn konsonantojn en unu vorto, ekz.: *helppeto, kelkkaze, radikgrupo*, sed dividu la vorton aŭ intermetu vokalon;
ke oni ne uzu tro da akuzativoj, sed klopodu jen kaj jen alterni ilin per prepoziciaj komplementtoj.
Fine, ĉar konsiloj ne ligiĝas al reguloj, sed estiĝas el okazaj bezonoj, oni ĉiam klopodu uzi klarajn kaj mallongajn vortojn. Tri-kvar klaraj vortoj impresas pli agrable ol unu logike ĝusta vortmonstro.

G. J. D.

CUPIDO TAMBIEN HABLA EN ESPERANTO...

Uno más hay que añadir a la larga lista de los matrimonios esperantistas, en que cada uno de los cónyuges pertenece a distinto país. ¡Y es que como los esperantistas tienen la manía de escribirse, sin tener en cuenta las fronteras!... El pasado mes de Junio, se ha celebrado en Rio Janeiro la boda de la gentil Srta. Nelly de Sousa Neto, empleada en el Tribunal de Cuentas, con el joven ingeniero y periodista holandés Ruilof Van Patten. Es interesante, para nosotros, resaltar el detalle que, por ignorar el uno el idioma nacional del otro, los novios solo pueden entenderse por medio del Esperanto que, con un hecho tan feliz como este, da cumplida respuesta a los que todavía preguntan si el Esperanto sirve para expresar las íntimas emociones y los puros sentimientos del corazón humano. Empezó el "flirt" tres años atrás, con un simple intercambio de correspondencia, y tuvo jubiloso desenlace, hace tan solo un mes, en la hermosa capital brasileña, ante un juez casamentero, el Sr. Chermont de Miranda que, en atención a las circunstancias redactó el acta en portugués y además en Esperanto, novedad jurídica en aquél país. Actuó de testigo, con otras distinguidas personas, el Sr. Carlos Domingues, escritor y Presidente de la Liga Esperantista Brasileña. Junto con nuestros plácemes, entusiastas y sinceros, no queremos terminar esta breve reseña sin la referencia de unos consejos, muy oportunos, que la feliz desposada ha dado a todas las solteras, por medio de la Prensa de Río: «... No os desesperéis, aprended el Esperanto y tendréis a vuestro alcance un remedio infalible para el logro de vuestras rosadas ilusiones...».

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● AFRICA DEL SUR. En la Escuela Técnica de Port Elizabeth se ha iniciado la enseñanza del Esperanto, con autorización de las autoridades académicas, siendo el primer apoyo oficial que recibe la lengua auxiliar en los centros docentes de aquel hemisferio.

● ALEMANIA. «Die Sürag», de Offenburg Beden), revista de radiofusión, publica la lista de las emisoras que difunden programas en Esperanto.

● AUSTRALIA. Los periódicos «Advertiser», de Adelaide, «The West Australian», de Perth, y «Herald», de Melbourne, han publicado el artículo «Basic English o Esperanto», del señor Herbert Koppel.

En la Escuela de Bellas Artes, de Ballarat, se lleva a cabo un curso de Esperanto, con gran interés y aprovechamiento

● BELGICA. «Le Moustique», de Charleroi, revista de radiodifusión, publica también la relación de programas en Esperanto que emiten muchas estaciones del mundo.

● BRASIL. Desde 1945, la emisora «Rádio Inconfidéncia», de Minas Gerais, mantiene su «Brazila Kroniko» en Esperanto, todos los sábados de las 17'— a las 17'30 (20'— a 20'30 Greenwich) en onda corta de 50 m. 6.000 kilociclos.

● DINAMARCA. Se ha constituído la «Federación Esperantista de Alumnos de Escuelas Superiores» con el fin de incrementar la Enseñanza del Esperanto en los centros superiores y mantener relaciones con organismos similares.

● ESTADOS UNIDOS. Ha sido designado Director de la Comisión Cultural de UNESCO el señor Herbert Lionel Elvin, eminente esperantista. «Pacific Unión College», de Angwin (California), mantiene un curso de Esperanto.

● HOLANDA. «Proceedings of the Woninklijke Nederlandsche Akademie van Wetenschappen» continúa publicando en Esperanto resúmenes de sus artículos en inglés. Ultimamente, dos del Laboratorio de dinámica de la Escuela Técnica de Delft: «Note on the damping of the rational oscillatión of a spherical mass of an elastic fluid in consequence of slipping along the boundary» y «Solutions of the equations fort he non-uniforn propagations of a very strong shock wave». «V.V.V.-Nieuws», de Eindhoven (Dommelstraat, 27) publica periódicamente artículos a doble columna en holandés y Esperanto. Esta revista es el órgano de la Sociedad de Turismo de la región de Brabante.

● IRLANDA. El órgano mensual «The Catholic Scout» mantiene una sección en Esperanto.

● ITALIA. Radio Roma ha reanudado sus emisiones en Esperanto, los viernes y domingos, de 17'— a 17'20 horas, en onda corta de 19 y 25 metros.

● MARRUECOS FRANCES. La administración de la P.T.T. en Rabat ha aceptado la solicitud del representante local de «Universala Esperanto-Asocio» para figurar en la lista telefónica, después de su nombre y dirección, la siguiente indicación: «Peranto de UEA por Maroko», con la consiguiente ventaja para los esperantistas de paso por aquella población.

Que «HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO» va siendo conocida en el extranjero lo demuestra no sólo el intercambio de prensa que mensualmente se hace y que, por nuestra sección «Inter la prozo de la Esperantista Gazetaro», todos pueden comprobar sino, por ejemplo los siguientes envíos que nos hacen asociaciones no esperantistas:

«Touring Club Italiano» (Corso Italia, 10 - MILANO) con carta del 19 de junio tiene la gentileza de remitirnos unos ejemplares de un folleto en Esperanto, sobre los servicios que presta a favor del turismo en Italia.

«Société Suisse de Radiodifusión» (23, Neuengasse - BERNE) nos ha remitido el folleto, que edita trimestralmente de su cuadro de emisiones para el extranjero, donde también aparecen las en español dedicadas a España y Sud-América, y las en Esperanto dentro de su programa para Europa. Agradecemos la gentileza.

LA KARAKTERO DE HOMO LAŬ TIES EKSTERA ASPEKTO

(Represo el la izraela gazeto LA VOKANTO)

Estas malfacile pruvi, ke la karaktero de homo speguliĝas en lia eksteraĵo. Verŝajne, oni povas fari multajn eksperimentojn kaj esplorojn en rilato kun ĉi tiu temo.

Laŭ mia opinio, ĉiu homo kapabla lerte rigardi povas konstati la evidentan interligon inter la karaktero de homo kaj ties ĝeneralaj eksteraj elmontroj: trajtoj de la vizaĝo, konstruo de la korpo, manieroj de iro, rigardo, parolo, rido, konduto, reago k.t.p. Mallonge, la homo plej morala, bonkora, kuraĝa, inteligenta kaj sentema estas tiu, kies vizaĝo havas belan aŭ ĝentilan aspekton, kies korpo estas gracie kaj harmonie konstruita. Alivorte tiu, kiu estas harmonia interne, ne povas esti alia ekstere!

Kontraŭ ĉi tiu lasta diro, oni povas ŝajne prezenti belajn aŭ bele aspektantajn personojn, kiuj estas kruelaj laŭ sia karaktero. Sed tio neniam estas plene vera; la afero estas jena: *Ni ne sufiĉe kapablas diferencigi inter beleco kaj malbeleco, inter bono kaj malbono.* En la naturo, samspecaj ecoj: kiel boneco, beleco kaj grandanimeco, kompatemo k.t.p. identiĝas unu kun la alia.

Persono, kiu havas en si ian econ, havas samtempe tiujn ecojn, kiuj estas samspecaj; almenaŭ, ili ne povas havi kontraŭajn! Alivorte, persono, kiu estas definitive «iel» je unu aspekto de la vivo, ne povas esti aliel en la ceteraj aspektoj. Tiu, kiu estas bela ekstere, devas esti tia ankaŭ interne, de ĉiuj flankoj kaj elmontroj de la vivo. Same, ĉiu aĉe aŭ misharmonie aspektanta, estas tia ankaŭ en sia animo. Se okaze ŝajnas al ni, ke ĉi tiu supra juĝo estas erara, tio devenas, do, de nia manko de talento por senti, observi kaj diferencigi la ecojn. Ĉu tio, kio ŝajnas al ni bela, estas ja vere bela? Ĉu nia okulo ne estas blindigita per malnova antaŭjuĝo, per ne bona edukado, aŭ per la influo de longdaŭraj ĉie akceptataj kutimoj?

Pli simple: Tre ofte, ni estas stultaj rilate la konscion pri la bono en ĝiaj gradoj kaj nuancoj; ankaŭ same pri la malo. Ĉiu povas ekzameni ĉi tiun temon per atenta kaj profunda rigardado al la ĉirkaŭantaj homoj, en ilia ĉiutaga vivo; ankaŭ al la bestoj kaj naturfenomenoj; eĉ al la tuta kosmo. Oni povas tiel konvinkiĝi, kiom multe la kutimo kaj la rutino de la vivo influas sur niajn sentojn, sciojn kaj opiniojn!

Rigardu ekzemple la laborbestojn, tenatajn de la homo; laŭ ordinara okulo, ili ĝenerale aspektas kvazaŭ *sataj, belaspektaj,* eĉ *kontentaj* pro la zorgoj, k.t.p. Sed provu rigardi ilin *enpense* kaj *sendepende* de trompitaj antaŭjuĝoj, kaj tiam vi vidos la tutan mizeron de tiuj bestoj, laŭ tuta ilia aspekto; eĉ en iliaj okuloj...

Konklude: Harmonio kaj misharmonio naturaj ne ekzistas samtempe en unu sama punkto.

SALOM ZAMIR (Tel-Aviv)



El Sr. Georger, jefe de la Policía de Hamburgo, la conocida población alemana, es un activo y entusiasta esperantista. A instancias suyas se organizó, la primavera pasada, un curso para componentes del Cuerpo, que resultó un éxito completo. El día de fin de curso, se celebró un sencillo acto, con asistencia de las autoridades, para entregar los diplomas a los nuevos esperantistas. Aquí vemos al Sr. Georger colocando el brazalete, con la palabra ESPERANTO, a uno de los 30 policías que desde ahora prestarán servicio oficialmente con este distintivo. Desde Abril, la revista del Cuerpo "DIE POLIZEI" (Am Schiffgraben, 29, HANNOVER, Alemania), publica una serie de 25 lecciones del idioma internacional

Neniam pli justa, neniam pli fakta, la dia sentenco, admone diranta, ke, per ŝvito de la frunto, oni gajnos sian panon... La falĉiloj jam ripozas en gardejo, sed la spikoj estas nun amaso sternita sur la malmola planko de draŝejoj, kie la pajlo kaj la greno, en densaj stakoj, ĝentile fordonas la rostitajn perlojn de siaj abundaj grajnoj por taŭga nutrado de la homoj. Ne kulpas, ne, la saĝa naturo se tie kaj tie multaj viroj grumblas, ĉar virinoj plendas, ke ankoraŭ infanoj malsatas... Ŝvebas fajro inter aero sufoka; soifas la gorĝoj, kun faŭkoj resekaj, kiuj avide frandas la facilan ĝuon de freŝa fadeno da akvo, kiun liveras, tra pinto de ajuto, la dika ventro de argila kruĉo, kvazaŭ portebla fonto, kies malvarmeta enhavo ĉiam estas preta por flui kaj flui sinsekve, same kiel fluas kaj

INTER LA PROZO DE LA

kvar sezonoj. Kaj nun, ĉe la ombro de kverko, mi metas en neton la suprajn impresojn de ĵusa legado. Jen do ili: ORIENTA REVUO logas la okulojn per sia plaĉe kolorigita prezento; ĝi estas emblemo de persisto kaj konstanteco; ĝia fundamenta stilo kaj funda esploro de gramatikaj detaloj estas modelo de klareco kaj logiko; ne nur ja la japanaj lernantoj, sed okcidentaj kaj eĉ spertaj esperantistoj povas lerni multon el ĝi pri lingvaj aferoj. Sed, en ĉiu numero mi serĉas vane kelkajn vortojn, kiel kvitancon, ke nia bulteno, la hispana informilo, venas akurate kaj regule en la landon de kimonoj kaj krizantemoj.

Saluton al ci, ho Parizo, belega urbo de la lumo, ki

fluas senĉese gutegoj da ŝvito sur la tanitaj fruntoj de la heroaj draŝistoj, kiuj strofon post strofo, laŭ takto de siaj draŝiloj, verkas la eternan poemon de la pano. Sankta, plej sankta, estas laciĝo pro utila laboro; sekve, meritita rekompenco estas la ripozo, kies daŭro fariĝas pli longa dum somero, por reakiri perditajn energiojn, revigligi velkantajn fortojn kaj povi, pli sekure, rekomenci la tutjaran batalon por tiu pano mem, kiu nun en la draŝejoj estas en preparo.

Ĉu vere neniel interesas tie la Valencia regiono, kie ankaŭ abundas la rizo kaj la oranĝoj, la migdaloj kaj la ĉerizoj, la ventumiloj kaj la artofajraĵoj? Per imaga flugo, mi troviĝas en Novjorko, la impona urbego, kie aperas PROBLEMOJ, nova hektografita gazeto, politika kaj informa, kun raportoj kaj komentoj. Jen denove en Eŭropo, mozaiko da nacioj kaj svarmo da titoloj por nia gazetaro: NORVEGA ESPERANTISTO fierete paradas kun sia bela uniformo.

en brulanta eksplodo de entuziasmo, rendevua cer

Sed ĉiam estas aktiva la ripozo por aktivaj homoj, inter kiuj, la esperantistoj plej alte rangas. Jam de longe, de klasika periodo ĝis hodiaŭ, la somero estas la kadro de la Universalaj Kongresoj, kiel celtabulo, kien iras ĵetitaj, en formo de rigardoj iluzioj kaj esperoj, dum tuta unu jaro, la simbolaj sagoj de nia diligenta kolegaro. Por kelkaj, tiuj iluzioj efektiviĝas, por aliaj la espero... restas espero. Sed, kial do plendi? Ĉu kolekti esperojn ne estas trafa okupo por esperantisto? Mi apartenas al tiu speco de kolektantoj; kaj la lasta deziro, registrita en mia kolekto, celas nur profiti la proksiman paŭzon, de monata libertempo, por serĉi kaj trovi novan kurieron, kiu pli akurate portos en la arbaron la legaĵojn pri kies revuado mi zorgas, honore al vi, sub la vetero de la

Interese estas rakonti pri grava mondonaco, de anonima abonanto, por ebligi vojaĝon al Parizo de unu el la redaktoroj; ĉar tiajn sciigojn oni devas disvastigi, mi pinĉas kelkajn vortojn el la letero, kiu akompanis la donacon: «Mi ĝuas la gazeton kaj bonegajn artikolojn dum la tuta jaro. Mi supozas, ke la redakcio havas multan laboron. La redaktoroj povus uzi sian tempon ekonomie pli bone. Tamen, ili perdas tempon, kaj tempo estas mono. Ĉu mi devas nur sidi kaj legi? Mi pagas mian abonon, jes. Sed, tion la redaktoroj ankaŭ faras! Tial, mi sendas mian modestan helpon kaj pagas malgravan kontribuon.» Mi ventolas la belajn vortojn kaj gratulas la feliĉajn redaktorojn kaj la anoniman samideanon al kiu sincere mi dediĉas la enkondukon de mia hodiaŭa kroniko,

ESPERANTISTA GAZETARO

ĉar eĥke li pruvis scii, ke la pano fariĝas el tritiko kaj ne el vortoj pli aŭ malpli belaj. Ĉarmaj bildoj, pri la norvega lando, kaj tre ĉarmaj pejzaĝoj, postenigas la gazeton sur honoran lokon ESPERANTO POST surprizas la legantojn, en ĉiu nova numero, per pli bela aranĝo kaj pli bona enhavo. Krom ampleksa atento al la lingvaj demandoj, kaj zorgaj konsideroj al la propaganda flanko kaj literatura angulo, kun ilustroj, en la lasta numero aperis la melodio kaj la teksto, kun esperanta traduko, de Vigla muzikaĵo. «Himno de la Eŭropa Junularo». NEDERLANDA ESPERANTISTO vere imponas pro sia grandeco, unu scienca artikolo pri la japana poezi-arto. En SENNACIULO estas leginda la frontartikolo «Retrospektivo kaj Perspektivo» de Konrado Deubler el Munkeno. LA INTERLIGILO daŭras en siaj fakinformoj, kiel revuo tre distra kun riĉa kaj diversa materialo. En ĝi, oni skribas: «Nia revuo estu por ni la taŭga loko, kie ni metie riĉiĝos, lingve disradios kaj persone altiĝos.» LA FEO estas hektografita junulara bulteneto, kun spritaj ilustroj, aperanta en Trieste. HELENA ESPERANTISTO venas denove, kiel mitologia fenikso, ĉar ĝi mem anoncis sian malaperon; kaj feliĉe, ĝi reaperas pli bela ol antaŭe. Miajn gratulojn, do, al Sro. Stamatiadis, vera patriarko de la esperantismo, ne nur interne, sed ankaŭ ekstere de la greka lando. LA SUDA STELO, de Jugoslavio, imponas pro be-

...iu estas nunjare, kiel fokuso de la tutmonda kulturo,

artikolo, «La Psikoteknikon» sobra sed klara, sufiĉas por doni altan kategorion kaj rangon al nia *artefarita* lingvo. Ankaŭ de Nederlando venas du pliaj gazetoj: LABORISTA ESPERANTISTO kun larĝa raporto de Lucien Laurat el Parizo, kiu faris prelegvojaĝon, tra la lando, kaj vive rakontas pri siaj spertoj. MATENRUGO kun sia gaja kaj *blindiga* titoldesegnaĵo estas akceptata ĉi tie kiel hejmeca komplemento. Ĝi estas monata eldono de sekcio en Haarlem, urbo lega prezento, dika nombro da paĝoj kaj serioza enhavo Mi ne povas eviti la tenton represi kelkajn vortojn, kiujn mi trovis en artikoleto: «Bedaŭrinde, ankoraŭ multaj gesamideanoj tro mallarĝe komprenas la belan koncepton *rondo familia*. Nia rondo familia estas la tutmonda esperantistaro; ĉiu kiu parolas kaj akceptas la ideon de **Internacia Lingvo estas** nia familiano.» La difino estas laŭdinda kaj salutinda ĉie en Esperantio.

Kaj, post ĉi tiuj konsideroj, venis la

...ntro kaj batanta koro de la universala esperantismo!

tre kara por mi, en kies Cikoni-strato ĵus okazis solenaĵo, kiun bedaŭrinde mi ne povis ĉeesti, sed pri kiu la petolemaj stratoj paseretoj certe informos al mi, se ne la cikonio mem, kiam ĝi venos en Hispanion por fari mendon pri la bebo, urĝe bezonata en la domo núm. 9 de la dirita strato. LA PRAKTIKO kaj HEROLDO kompletigas la nederlandan serion, sen forgeso pri la bonega studfolio LA PROGRESANTO. Malgranda salteto kaj kaprioleto metas min en Francion. Nu tio estas nur metaforo; ĉar... se vere, Sro. Schwartz devus enŝovi plian «koboldaĵon» en la varietean programon. FRANCA ESPERANTISTO, kiel kutime, prezentas detalajn informojn pri la diversaj sekcioj, krom tio abundas elektitaj literaturaj pecoj kaj riĉa kolekto da proverboj. Specialan intereson havas fino al mia latino, laŭ vortoj de la konata proverbo. Kiel antaŭe dirite, mia ripozo estos nur simbolo, sed tute ne fakto, kvankam fakto estos la interrompo de niaj rilatoj, dum monato Aŭgusto; tamen, kiel fidela gardostaranto, mi ĝojos en la strebado fajli malglataĵojn, se vi ĉiuj, karaj geamikoj, sukcesas en viaj esperoj ekpaki kofrojn kaj valizojn, aŭ simplajn tornistrojn, por ekskursi, se ne al Parizo, Romo aŭ Torino, almenaŭ al iu alia fora loko, eĉ por plue zorgi pri novaj zorgoj, ĉar ŝanĝi kelktempe la kutiman okupon, aŭ la kutiman medion, estas ja maniero de ripozo.

Ĝis revido! Agrablajn emociojn kaj dolĉajn aventurojn, en via libertempo, deziras al vi tutkore

LA LEGEMA KOBOLDETO



De la grava eldonejo "The Esperanto Publishing" ni ricevis jenan leteron, kiu, kvankam kun privata karaktero —precipe pro tio!— malkovras tute sincere unu el la malhelaj flankoj de nia Movado. Kun la opinio, ke la veron oni devas alfronti sen timo, ni submetas la dokumenton al la konsidero de niaj legantoj, kiuj certe zorgos, per pozitiva ago, studi volonte la aferon, pri kiu prave plendas la kompetenta entrepreno.

Al la Redaktoro de
"BOLETIN"
Ruzafa. 7 - VALENCIA (Hispanujo)

Estimata samideano!

Kun granda intereso, ni legis la artikolon «Por pli plana literaturado» en la junia número de via Bulteno. La propono de Sro. Thorsen, ke oni solvu la problemon en la Pariza Kongreso estas iom naiva, ĉar tiun problemon la kongreso povus solvi **nur** se ĝi disponigus la monon necesan por eldonado, sed tion ĝi ne havas! Sekve, nur la eldonejoj, kiuj disponigas la necesan kapitalon povas fari decidojn pri la kvalito, aŭ alia eco, de la eldonota literaturo.

La problemo ne estas tiel simpla, kiel ŝajne supozas Sro. Thorsen. Li — kaj multaj aliaj — volas vidi en Esperanto la klasikaĵojn de la diversaj landoj. Tiu revo estus facile plenumebla se la Esperantistoj aĉetus tiujn klasikaĵojn post eldoniĝo; sed la sperto montris, ke ili **ne** tion faras. Laŭ nia scio, diversaj klasikoj estas eldonitaj — menciindaj estas la verkoj en la serio «Internacia Mondliteraturo» de Ferd. Hirt & Sohn en Leipzig — kiuj bezonis proksimume 20 jarojn por elvendado, kaj el ili ankoraŭ estas haveblaj **en la unua eldono**, do, post 25 jaroj! Ni mem vendis da **Quo Vadis** meznombre 20 ekzemplerojn en jaro, dum 7 sinsekvaj jaroj! Aliflanke, popularaj romanoj elvendiĝas en proksimume duono de la tempo kaj permesas reakiron de la kapitalo, por plua eldonado. Por eldoni 250-paĝan libron oni nun bezonas proksimume 42.000 pesetojn, sen la kosto de bindado. Por klasiko la granda plimulto de tiu mono estus blokita dum pli ol 10 jaroj, kaj tio signifas, ke se oni volus eldoni regule verkaĵojn, la eldonejoj devus disponi pri kapitalo de minimume 500.000 pesetoj! Neniu Esperanta eldonejo disponas pri tia kapitalo kaj, sekve, la entreprenoj devas pensi pri la pli bone vendeblaj verkoj: lernolibroj, vortaroj kaj romanoj. Por ankoraŭ detaloj, pri ĉi tiu tre grava problemo, oni legu nian artikolon en la aprila (1950) numero de «Esperanto» (p. 57).

Tamen, de tempo al tempo, la eldonejoj klopodas kontentigi la bezonon; kaj ni mem nun negocas pri eldono de Angla kaj Skota Antologio. La kapitalo bezonota tamen sekvigos, ke du-tri jaroj devos pasi antaŭ ol la plano efektiviĝos.

Kun salutoj, plej samideane via

por
ESPERANTO PUBLISHING COMPANY
Cecil C. Goldsmith

Paroli pli aŭ malpli flue, skribi pli aŭ malpli korekte, kaj garni sian jakon per verda steleto: Jen estas la fundamentaj kondiĉoj por ordinara esperantisto! Sed tio konsistigas, oni povas diri, la materian aspekton de nia idealo; ĉar, krom tio, ĉiu konscia esperantisto. interne kaj ekstere de la Movado, zorgas kaj atentas pri kelkaj aliaj devoj. Jes, eĉ plej modesta samideano, se li volas rajte meriti tiun nomon, devas oferi tempon, kapablon kaj... monon, ĝis la maksimuma grado de sia povo. Ekster niaj vicoj, la taskoj estas diversaj kaj variaj, laŭ la medio kaj **cirkonstancoj**, en kiuj ĉiu aparta esperantisto disvolviĝas private, socie, profesie... Tiuj specifaj medioj estas fekunda agadkampo, kie lerte ni bezonas agi por plej efika propagando de nia ideo, kiu certe estos des pli simpatie kaj plaĉe rigardata, ju pli honesta kaj deca estas la konduto de la koncerna esperantisto, pruvanta tiel que verda stelo, ĉe la jako, ne estas signo de stravaganca manio, nek malkara kontramarko, sed emblemo kaj garantio, kvazaŭ registrita patento, de plej fidinda kaj alta civitaneco!

BABILADETO

Diversaj pensoj kaj aforismoj de SANTIAGO RAMÓN CAJAL

Santiago Ramón Cajal (1852-1934) gloro de la hispana kaj tutmonda Medicino, estis laboranta sciencisto kaj pensanta homo, kiu, pro sia multjara vivo, akiris fundan sperton pri la plej diversaj aferoj, ĉar li ne nur faris gravajn eksperimentojn, interne de laboratorio, sed ankaŭ trafajn observojn, meze de la strato. Tial, krom fama histologo, li estis libera homo, modela civitano kaj saĝa filozofo, kiu volis averti kaj atentigi, verŝajne iomete sarkasme, pri ordinaraj aspektoj de la socia medio. El la ĉi-suba kolekto, oni tiru do adekvatajn konkludojn, laŭ la propra kriterio kaj personaj spertoj de la leganto.

La vero estas mordanta acido, kiu tre ofte vundetas per siaj elŝprucaĵoj tiun, kiu ĝin manipulas.

* * *

Esti amiko de la amikoj estas malfacila afero, se oni ne volas esti samtempe malamiko de la justeco.

* * *

Kiam al iu ĉio iras glate, tiu kredas, ke same glate ĉio iras al aliaj.

* * *

Se oni malamas nenion, tio egalas al la konfeso, ke oni amas nenion, kaj ke oni estas indiferenta antaŭ la maljusteco, la malindeco kaj la tiranio. Ĉar, same kiel ekzistas sanktaj amoj, ankaŭ ekzistas plej sanktaj malamoj.

* * *

Verŝajne, du aferoj estas necesaj por plena feliĉo: esti *simpla homo* kaj, cetere, *homo simpla.*

* * *

Malgraŭ la opinio de riĉaj parvenuoj aŭ obstinaj nenionfarantoj, ĉiu utila kaj regula laboro estas nun ankoraŭ la distro plej agrabla.

* * *

Kiam sunradio trafas vitron, ĝi malkovras kaj eĉ pliigas ĝiajn malperfektaĵojn. Tiel same la oro efikas sur la animo: ĉiuj malvirtoj kaj ĉiuj intelektaj difektoj fariĝas, tiam, evidentaj.

* * *

Sen granda dozo de indulgemo, neniu estimo pludaŭras.

* * *

Ne evitu la virinojn, dum via juneco se vi ne volas kuri post ili. stulte kaj ridinde, dum via maljuneco.

* * *

Se inteligenta homo parolas malŝate pri idealistaj aferoj, tio signifas, ke li estas filistro, maskita kiel deca persono.

Evidenta estas la fakto, ke ju pli malmulte da vivo al ni restas, des pli multe ni alkroĉiĝas al ĝi. Tamen se la vivo devas esti daŭra kreado, kial do tiu obstino konservi neston sen birdoj kaj cerbon sen ideoj?

* * *

Arangu vian vivon laŭ maniero, ke en la hejmo oni nomu vin stultulo, kaj en la socio, bonfaranto.

* * *

La virto kaj la talento ne ŝatas loĝi kune en sama kapo.

* * *

Malmulte vi valoras, se via morto ne estas dezirata de multaj personoj.

* * *

La homo nur estas sincera en siaj intimaj monologoj.

* * *

Virinmalamiko devas memori, ke plej malklera kaj kruda virino kapablas naski genian viron.

* * *

La kiso, tiu dolĉa kareso, kiun la poetoj konsideras kvazaŭ sublima kunfandiĝo de du animoj, ne alio estas, por sciencisto, ol nura interŝanĝo de buŝaj mikroboj.

* * *

Same kiel balono, klera edzo perdiĝus ofte tra la lazuro, se ordinara edzino, kvazaŭ balasto, singarde kaj prudente, ne tirus lin malsupren.

* * *

Eĉ plej eta virino, posedanta belecon kaj simpation, ĉiam sukcesos altiĝi ĝis la koro de viro.

* * *

Ĉu vi fieras pro tio, ke neniu vin malamas? Ho, tiuokaze, vi vin pleje ofendas! Ĉu vere al neniu vi parolis sincere? Ĉu vere neniam vi agis laŭ plena justeco?

Kompilis kaj tradukis el la hispana lingvo LUIS HERNANDEZ

ONI DIRAS, KE...

Oni diras kutime, ke la danoj ŝatas ofte ŝercprovoki unu la alian. Ĉar mi mem apartenas al ĉi tiuj ŝercemuloj, tiam mi povas konfirmi, ke la onidiro pravas. Ni ridas, kiam bonhumora satiro trafas sian celon. Ni ridas se iu artisto sukcesas ĝisfunde karikaturi la eminentulojn, ĉu temas pri animo-fleganto tro klopodema, aŭ pri ŝtata ministro. Ju pli oni faras satiron pri iu aŭ alia ministro, des pli granda estas lia populareco.

Kiam iu familio festas naskiĝtagon, geedziĝon kaj similajn gravajn tagojn, tiam oni nature kantas la neeviteblan amuzan kanton, kiu enhavas ŝercprovokaĵojn, enpakitajn per dolĉaj vortoj. Dum preskaŭ dudek jaroj, mi faras tiajn kantojn laŭ mendo, entute ses-cent diversajn, kaj tial mi scias bone pri kio mi skribas. Antaŭ kelkaj monatoj edziĝis bona amiko, kiu loĝas en la malproksima Afriko. Tuj mi kaptis mian fontplumon kaj «tordis la cerbon», t.e. mi cerbumis pri amuza gratul-letero. Jen ĝi estas:

Tre kore mi salutas vin
pro la feliĉa tago ....,
ĉu estas bela la edzin'
kaj granda ŝia saĝo ...?
Sendube vi respondos: «Jes,
entute mi ne plendas».
Vi estas ja fidela edz'
kaj ĉiam ŝin defendas.
Per kant' amuza tiu ĉi
hodiaŭ mi petolas
kaj nun, rapide, mi al vi
gratulon sendi volas.
Post kelka temp' en via nest'
infano certe venos;
pro tio ja okazos fest'
(vi min sen dub' komprenos).
Memori ĉiam devas vi
(ĉu ne nun vi ekridos?)
ke en la hejmo ofte ŝi
iaman fraŭlon bridos.
Vi emas fari laŭ dezir'
senkulpan strat-promenon;
-ho... ŝi atendos —kun sopir'—
malfrue la revenon ...
Se trovus cindron la edzin'
hazarde sur tapiŝo,
sincere mi kompatus vin
en via malfeliĉo.
La kor-reĝinon piku ne
dum kiam ŝi sin vestos;
singarda edzo scios, ke
ŝi tre grumblema restos.
Finiĝos baldaŭ mia vers'
pri „vivo-pun' memvola".
Kaj jen komprenu: Tia ŝerc'
ja estas nur petola.
Treege mi envias vin
pro tiu ĉi trezoro
(jes, tiel mi ja nomas ŝin)
pli kara ol la oro.
Vi kun sincer' akceptu nun
la bondeziron mian:
ke ĉiam la prospera sun'
lumigos hejmon vian.
Jes, ĉiam oni estu du
kaj iru man' en mano.
Hura! Hura! kaj tiel plu,
kaj nun „Je via sano"!

Bebel Sorensen
Farum, Danlando

VENU AL ARNHEM!

Nederlandanoj kaj eksterlandanoj de ĉiuj rangoj kaj klasoj estas invitataj viziti dum la someraj monatoj nian nacian ekspozicion MEJLOŜTONO 1950, kiu estos tute alie organizata ol la ekspozicioj, kiujn oni ĝis nun aranĝis en Nederlando. Nia entrepreno fariĝas, do, kultura altnivela socia faro, efektivigata pere de intima kunlaboro inter la registaro, la urbestraro de Arnhem kaj la tuta loĝantaro. Ne temas, do, pri ciferoj nek pri statistikoj, sed pri granda belega spektaklo kun agrablaj pavilonoj, elektataj de kompetentuloj kaj bildigataj de la plej famaj artistoj.

Venu kaj vidu! La arnhemaj liberuloj akceptos vin ĉiujn, kiel gastojn.

Je la nomo de la ekspozicia estraro

Mr. J. Huges (Delegita Membro
Jansbinnensingel, 20

IMPORTANTE

Sugerimos a todos los samideanos que prueben a recibir revistas esperantistas del extranjero, enviando a sus corresponsales números de nuestro boletín y pidiéndoles a cambio periódicos esperantistas de su respectivo país. De esta forma se pueden leer numerosas publicaciones esperantistas extranjeras, cuyas suscripciones, a la mayoría de ellas, es completamente imposible por no poderse enviar su importe. Tenemos reservas de casi todos los números atrasados y los números corrientes se editan en número suficiente para atender las demandas de nuestros lectores.

Si alguno desea que hagamos los envíos del boletín directamente a sus corresponsales, también lo haremos con mucho gusto.

LA ADMINISTRACION

BONHUMORA ANGULO

Junulo insiste postulas de fraŭlino rendevuon sed ŝi restas ĉiam necerta pri la decido. Alvenas la tramo kaj sen konkludi ion ŝi ekiras por enveturiĝi sed li insiste haltigas ŝin sur la enirbreto, dirante: —Do fraŭlino, diru, je kioma horo ni rendevuos morgaŭ?

—Aŭskultu —ŝi tedite respondas— venu ĉi tien je la tria; atendu min ĝis la kvara; se je la kvina vi ne vidos min vi povas foriri je la sesa!

* * *

—Mi neniam estus kredinta, ke vi edzinigus tiun knabinon. Vi ĉiam diris al mi, ke vi ne enamiĝis pri ŝi...

—Ja... mi ne amis ŝin.

—Kial, do, vi edziĝis kun ŝi?

—Ĉar ŝi estas bona muzikistino...

—Sed, en tia kazo, ĉu ne estus pli bone aĉeti fonografon?

* * *

—Mi venas ĉe vi, sinjoro; ĉar mi suferas pro maldormemo.

—Pardonu; vi eraris pordon ĉar mi estas veterinaro...

—Mi scias, sed mia maldormemo dependas de hundo.

—De hundo?

—Jes de la hundo de mia najbaro, kiu dum la tuta nokto bojadas sur teraso. Ĉu vi ne povus, sinjoro, skribi por mi recepton, por ke ĝi silentu por ĉiam?

* * *

Oficisto estis pleniganta demandfolion disdonitan de lia administracio. Ĉe la demando: «Kiu estas via rekta superulo?» li, senhezite skribis: «Mia edzino».

SPECIALA RASO

Post longa tempo, mi renkontis surstrate mian malnovan amikon Karlo. Li aspektis ne tre ĝojmiene; tio ŝokis min, ĉar li ĉiam sin montris ruĝvanga kaj dikventra. Al mia demando li respondis ĉagrenite:

—Jes, ja; mi ne tre bone fartas, de kiam mi fariĝis ambiciema... kaj, sukcesis! Dirante tion, li fermis siajn pugnojn, grincigis la dentojn; kaj poste, senfortigita, li sopiris kompatinde kaj melankolie.

Mi frapetis lian ŝultron; kaj, rememorante niajn junajn jarojn, en la Gimnazio kaj en la Universitato, ni ambaŭ sidis apud tablo, ĉe bulvarda teraso de kafejo. Tie li klarigis al mi sian tragedion.

—Vi jam scias, kiom mi ŝatis la bredadon de kokoj kaj kolomboj. Mi perfektiĝis en tiu fako, je tia grado, ke en mia regiono neniu alia bredisto gajnis tiom da premioj, medaloj kaj diplomoj. Mi multe fieris pri tio. Precipe, miaj kolegoj enviis min, ĉar mi akaparis ĉiujn premiojn, pro speciala bredado de kurieraj kolomboj. Ĉio iris glate, ĝis mia kuzo Aleksandro revenis de Ameriko. Ĉu vi rememoras? Jes, Aleksandro, tiu friponeto! Li venis kun tri grandaj kestoj, plenaj de kaĝoj kaj kaĝetoj. Imagu, li kunportis sesdek papagojn! Kiel belaj ili estis! Ĉiu el ili estis poemo el vivaj koloroj. Ili ĉiuj, per siaj okuletoj, malice rigardis min, kvazaŭ ili dirus: Tiom da jaroj bredante birdojn... tamen, nur mizerajn rezultatojn vi atingis. Nu, jen ni estas belaj, pli belaj ol viaj birdoj, kaj, plie, ni parolas, paroladas kaj eĉ paroladegas... Nu, Aleksandro, tiu pirato, ĉiam korinklina al mi, komprenante mian animstaton, donacis al mi dek el tiuj plej lertaj kaj babilemaj birdoj. De tiam nestiĝis ĉe mi ambicia ideo: Pro tio, ke mi atingis tiom da sukcesoj, krucigante kolombojn el diversaj rasoj, kiuj fariĝis pli kaj pli rapidaj en flugado, kial ne krucigi nun ilin kun la papagoj, por akiri kurierajn birdojn, kiuj parole povos transdoni la depeŝojn? Sub la premo de tia obsedo, mi neglektis ĉiujn aliajn aferojn, kaj entreprenis la esperplenan taskon. Ĝi daŭris tri jarojn...

—Kaj, finfine?...

—Finfine... la tregedio!

—Ĉu vi do ne sukcesis?

—Jes, mi sukcesis... duone.

—Ĉu, duone?

—Jes, mi sukcesis havi specialan rason, kiu estas duone papaga kaj duone kolomba, sed...

—Nu, kio?

—Tiuj specialaj birdoj flugas kiel papagoj, kaj parolas... kiel kolomboj!

CIRANO

LA RIDO ANKAŬ ESTAS TRE BELA KVALITO DE ESPERANTO!

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.

J. VIGO MESTRE.—«El Barato», Martinet de Cerdaña (Lérida), deziras korespondi kun fremdaj samideanoj pri arto kaj moroj.

DR. E. TUDELA.—Ruzafa, 43. Valencia. Dez. koresp. kun ĉiulandanoj pri div. temoj. Respondo garantiata.

FERNANDO LOPEZ.-Alberto Lista, 3. Sevilla (Hispanio). Dez. koresp. kun gejunuloj pri diversaj temoj hispane au esperante.

RAFAEL VIZCAINO. C. Maluquer, 5, pral. 8.ª Valencia. Dez. interŝ, p. m. kun ĉiuj landoj. Serioza propono.

ROLF UNGER (21 a) Elverdissen, n.° 131 b. Herford (Westf.) Germanio, 30-jara oficisto en malsanula asekuro, dez. koresp. per ilustritaj kartoj kun hispanoj.

Agrupación Excursionista «TIERRA Y MAR» Esperanto-Sekcio. Virgen de la Salud, 2 SABADELL (Barcelona). Dez. korespondi kun ekskursemaj asocioj.

IBERIA CULTURAL FILATELICA estas tre serioza organizo por filatelistoj. Skribu, petante informojn, al S-ro Carlos Mestre, calle Alta, 20, 1.°, Valencia (Hispanio)

Podemos también recibir y servir otros libros en Esperanto, pero a fin de saber que títulos pueden interesar, para no almacenar ejemplares que se nos queden sin vender, sería conveniente que se nos encargara por anticipado, el libro que se desee.

PARA NUESTRO BOLETIN

7.ª lista de donativos (JULIO 1950)

Suma anterior	**729**	**Ptas.**
J. Juan Forné (Valencia)	**5**	»
Domingo Cebollero (Zaragoza)	**5**	»
Gregorio Esteban (Zaragoza)	**5**	»
Rafael Vizcaíno (Valencia)	**10**	»
Ramón Dubón (Valencia)	**10**	»
Vicente Santamaría (Valencia)	**20**	»
Juan Bosch (Valencia)	**25**	»
Total	**809**	»

Después de las vacaciones estivales, esperamos que se reforzará esta sección con nuevos bríos

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Socio de número ...	12	ptas.	anuales
Socio abonado.. ...	25	»	»
Socio protector... ...	50	»	»

Las dos últimas categorías dan derecho a la recepción de nuestro Boletín.

Los socios protectores recibirán DOS ejemplares
Los nuevos miembros recibirán todos los números que se hayan publicado anteriormente durante el año

GRAVA ATENTIGO

Pro somera libertempo de la redaktoroj, dum monato Aŭgusto nia Bulteno NE aperos. La proksima numero, kun elektita enhavo, ne vizitos vin denove ĝis mezo de Septembro. Bonvolu atenti pri tio!

Ultimas noticias sobre el XXII Congreso Internacional de los Esperantistas Católicos

Este Congreso se celebrará del 13 al 20 de agosto, en la Universidad Pontificia de San Antonio, (Vía Merulana 124, b, Roma) la cual es también el domicilio del Comité Organizador. Hasta ahora figuran, como Congresistas Honorarios: dos cardenales, tres obispos y el Presidente del Consejo de Ministros de la República Italiana, señor Alcide de Gasperi. El Presidente del Comité Organizador es el profesor de dicha Universidad, el franciscano Padre Modesto Carolfi. Se espera la asistencia de unos 2.00 congresistas de 18 naciones diferentes, incluyendo a España y Portugal, si logran vencer algunas dificultades, que sólo posibilitan la asistencia en viaje de gran lujo, a cargo de agencias turísticas.

También se espera a Monseñor Théas, Obispo de Tarbes-Lourdes, veterano y entusiasta esperantista, y uno de los más elocuentes oradores sagrados en Esperanto, así como el jesuíta Padre Franciscano O. de Barros Leal, de Porto Alegre (Brasil), el Padre Corte, (de Brujas), el Padre Beckers, (de Bélgica), y otros muchos elocuentes predicadores en esta lengua, que tan gran difusión está logrando.

IMPORTANTE

Radio Roma retransmitirá la sesión de apertura del XXII Congreso-Peregrinación Internacional de los Esperantistas Católicos

La direción de Radio Roma (ENIT), ha tomado el acuerdo de retransmitir la solemne sesión de apertura del XXII Congreso-Peregrinación Internacional de los Esperantistas Católicos, que se celebrará en la Universidad Pontificia de San Antonio, el domingo día 13 de agosto, a las cinco de la tarde hora española.

A este Congreso-Peregrinación dedicará cuatro emisiones, las del día 11 de agosto, dedicada a saludos de las personalidades asistentes de 8 naciones, la del día 13 ya reseñada, y las de los días 18 y 20. Todas a las 5 de la tarde, y en ondas cortas de 19 y 25 metros. Los radioescuchas esperantistas están, pues, de enhorabuena.